

FEBRUARO 2003

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2003:1



**Chaplin, diktatorn och
esperanto, sid. 6**

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
 Monato 2003 • 91-a jarkolekto
 Fondita en 1913

Redaktion: Leif Nordenstorm

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: nordenstorm@hem.utfors.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi & Leif Nordenstorm

Tryck: Al-fab-eto, Skövde

Prenumeration 2003: 200 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
 Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
 tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se

Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2003:

Direktansluten medlem 200 kr.
 Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.
 Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*. Tilläggsexemplar kostar 100 kr/år).

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
 Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

Manus till La Espero

sänds till Leif Nordenstorm

Järnvägsgränd 11

961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

När kommer *La Espero* 2003?

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 2	28 februari	28 mars
Nr 3	16 maj	13 juni
Nr 4	7 augusti	8 september
Nr 5	17 oktober	17 november
Nr 6	20 november	8 december

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

**Mats Landfors:
La justeco estas blinda**

Numero 4-2002 de Kristliga Esperantoförbundets medlemsblad aperigis memprezenton de Mats Landfors sub la rubriko "La justeco estas blinda". Ni aperigas ĝin ankaŭ en La Espero kun kelkaj kompletigoj. Mats skribas:

"Eble vi iam aŭdis la supre menciitan, strangan esperimon. Tamen mi kiel blindulo laboris por la sveda ŝtato kaj por sveda justeco dum 40 jaroj, kaj en oktobro 2002 mi ricevis mian pension.

En la jaro 1960 mi frekventis specialan lernejon en la sudsveda urbo Växjö por lerni mian profesion, kiu nun nomiĝas ĉe ni juĝeja asistanto. En 1962 mi ricevis laboron en tribunalo de la urbo Sundsvall en la suda parto de norda Svedio. Sundsvall estis por mi tute fremda urbo, kaj tie mi konis nenium. Sed post kelka tempo mi ricevis bonajn amikojn dank' al Esperanto, kaj tie mi ankaŭ post kelkaj jaroj trovis mian edzinon Anna.

Unue estis je mia dispono nur du teknikaj helpiloj, nome iama ordinarra (kaj poste elektra) skribmaŝino kaj speciala, per la piedoj manipulebla sonbendaparato. En Svedio oni surbendigas la juĝejajn procedojn, kaj mia tasko estis protokoligi, skribe redoni la surbendigitajn pridemandadojn.

Dum la 80-aj jaroj aperis la unuaj digitalaj helpiloj por blinduloj. Unu estis la tiel nomata Versabraĵo, speco da komputilo kun brajla klavaro, konektita al elektronika skribmaŝino. Per ĝi mi povis mem korekti miajn skribaĵojn. Pli frue vidanta persono devis ĉiam tralegi miajn protokolojn kaj korekti miajn (espereble ne tro oftajn) skriberarojn.

Dum la 90-aj jaroj ĉiuj svedaj juĝejoj ricevis komputilojn. Mia komputilo estis ekipita per kelkaj specialaĵoj, nome skanilo, ekranoleganta programo, brajla displaĵo kaj sinteza voĉo. Per tiu ĉi helpilaro mi povas senprobleme mem kontroli, korekti kaj redakti ĉiujn miajn skribaĵojn. Per la brajla displaĵo aperas je linio post linio la ekrana teksto en brajla skribo. La sinteza voĉo legas ekzemple simbolojn kaj ceterajn mesaĝojn sur la komputila ekrano.

Dum mia kvardekjara laboro kiel tribunala protokolisto mi devis skribi pri multaj malagrablaĵoj: murdoj, seksperfortoj k.t.p. Mi ankaŭ povis multe lerni pri la socio, pri la kondu-



to de homoj kaj pri multaj aliaj aferoj. Mi ofte povis konstati, ke mi malgraŭ mia vidhandikapo povas kaj rajtas esti feliĉa dank' al Dio, precipe se mi pensas al ĉiuj malfeliĉuloj pri kies situacioj mi devis skribi."

Tiel finiĝas la skribita memprezenton de Mats Landfors. La redaktoro de *La Espero* aldonis kelkajn demandojn:

Kie vi naskiĝis? En Örnsköldsvik.

Kiajn interesojn vi havas krom Esperanton? Mi interesiĝas pri lingvo kaj muziko. Mi ŝatas ludi pianon.

Mi memoras ke kiam estis Sveda Esperanto-Kongreso en Sundsvall en 1988 vi tre interesiĝis ludi precipe svisan pianan muzikon, kaj mi memoras ke vi lernis lingvon, kiun tre malmultaj eksterlandanoj, do nesvisoj, lernis. Jes, mi lernis la retirumanĉan.

Via edzino nomiĝas Anna, sed ĉu via familio konsistas el ankoraŭ iu? Jes, ni havas filinon, kiu nun naskis infanojn. Do, mi estas jam avo.

Ĉu vi havis iujn taskojn en la Esperanto-movado? Jes mi estis sekretario en la Sundsvall-a Esperanto-Klubo. Nun mi estas nova prezidanto de Kristana Esperanto-Federacio en Svedio.

**Skribis: Mats Landfors
 Kompletige intervjuis:
 Leif Nordenstorm**

La redaktoro dankas al ĉiuj, kiuj sendis materialon por *La Espero*. Mi esperas ke vi ankaŭ estonte sendos material, eĉ se ne ĉio povos aperi. Se vi volas vidi viajn skribaĵojn en *La Espero*, skribu mallonge. Tio pli grandigas la eblecojn aperigi ilin.

La redaktoro

Stockhoms universitet drar igång esperanto-kurs höstterminen 2003

Sedan några år tillbaka finns en fem-poängs kurs i interlingvistik och konstruerade språk vid Stockholms universitet. Kursen har genomförts ett vid ett par tillfällen. La Espero kan nu rapportera om en verkligt god nyhet för alla esperantovänner. Från hösten 2003 kommer det att vara möjligt att studera esperanto vid Stockholms universitet. Det första tillfället blir hösten 2003 (delkurs 1 och 2) och våren 2004 (delkurs 3 och 4). Den som huvudsakligen kommer att ha hand om undervisningen är docent Joakim Envall. Professor Hartmut Trau Müller kommer undervisa i interlingvistik. Eventuellt kommer även andra lärare att undervisa.

Meningen är att kursen skall ges varje år. Om det är möjligt beror på hur många studenter som deltar och blir godkända.

Mer information om esperanto vid Stockholms universitet kommer med säkerhet i La Espero.

Utdrag ur kursplanen

Förkunskapskrav och andra villkor för tillträde till kursen

För tillträde till kursen krävs, förutom grundläggande behörighet för högskolestudier, normalt: svenska 3 åk/etapp 3/kurs B samt B-språk 2 åk eller C-språk 3 åk/motsvarande. Betyget i vart och ett av dessa ämnen skall vara lägst 3.0 eller alternativt Godkänt. Kraven kan ersättas med annan för kursen relevant meritering.

Kursens mål

Kursen vänder sig främst till nybörjare. Kursens mål är att ge grundläggande kunskaper i esperanto och färdighet i att använda språket muntligt och skriftligt. Vidare ges en allmänlingvistisk orientering om mellanfolklig kommunikation och konstruerade språk.

Kursens uppläggning

Kursen består av följande delkurser:

- 1 Introduktion till esperanto, 5 poäng
- 2 Interlingvistik och konstruerade språk, 5 poäng
- 3 Fördjupning i esperanto, 7 poäng
- 4 Realia, 3 poäng

Kursens innehåll

5.1 Delkurs 1: Introduktion till esperanto, 5 poäng. Delkursen ger elementär kunskap om språkets struktur och viss färdighet i att använda språket passivt och aktivt i tal och i skrift.

5.2 Delkurs 2: Interlingvistik och konstruerade språk, 5 poäng. Delkursen är en introduktion till vetenskapen om de mellanfolkliga språken. Inom delkursen behandlas huvudsakligen grammatisk struktur, konstruktionsprinciper, målsättningar och sociala funktioner hos konstruerade språk och bildskriftssystem. Strukturen hos spontant nyskapade språk (pidgin- och kreolspråk) tas också upp. Kursen berör även beslutsteori och val av språk, språkliga universalier, logik och konversationsregler, språkvårdsprinciper, språktypologi och kulturkretsar.

5.3 Delkurs 3: Fördjupning i esperanto, 7 poäng. Delkursen ger fördjupad kunskap i esperanto samt ytterligare färdighet i att använda språket muntligt och skriftligt.

5.4 Delkurs 4: Realia, 3 poäng. Delkursen ger en orientering om esperantorörelsens historia fram till idag samt om litteratur på esperanto.

Undervisning

Undervisning ges i mån av resurser. Beslut om undervisningens närmare uppläggning för varje delkurs och om den undervisning som ska vara obligatorisk fattas av institutionsstyrelsen.

Kunskapskontroll och betygssättning

Beslut om kunskapskontrollens form och organisation fattas av institutionsstyrelsen.

Som betyg på hela kursen och på delkurserna används något av uttrycken Vål godkänd, Godkänd och Underkänd. Den som har godkänts i prov får ej undergå förnyat prov för högre betyg.

Examinator på hela kursen och på delkurserna utses av institutionsstyrelsen.

Student som underkänts i ordinarie prov har rätt att delta vid ytterligare provtillfällen; det första omprovet skall anordnas i nära anslutning till det ordinarie provet. Student som underkänts två gånger i prov på kur-

sen eller på del av kursen har rätt att hos institutionsstyrelsen begära att annan examinator utses.

Kurslitteratur

Beslut om kurslitteratur och i förekommande fall övriga läromedel kommer att fattas av institutionsstyrelsen.

Ämnesbeskrivning

Esperanto är ett konstruerat språk som började användas i slutet på 1800-talet. Det är det konstruerade språk som används mest, men uppgifterna om antalet talare varierar vida beroende bl.a. på den kompetensnivå som avses. Utbildningen i esperanto vid institutionen för lingvistik på Stockholms universitet syftar främst till att ge praktiska färdigheter i språket, men även teoretiska kunskaper om mellanfolkliga och konstruerade språk i allmänhet.



Ĝis la 31a de decembro

aliĝis al la Universala Kongreso de Espeanto ĉirkaŭ 600 personoj el 50 landoj, ĉefe el Svedio, Francio, Germanio, Japanio, Nederlando, Danio kaj Finnlando.

Ĉu ankaŭ vi?

Årskongress i Skövde 26-27 april

Svenska Esperantoförbundets kongress kommer i år att äga rum i Skövde 26-27 april. Naturligtvis kommer programmet till stor del att kretsa kring den kommande världskongressen i Göteborg. Ett bra tillfälle att bli informerad kring de aktiviteter som du kan bli en del av genom att ställa upp som medhjälpare (esp. helpanto) för några timmar, för en dag, eller längre.

Kongressavgiften är 250 kr. (SEJU-medlemmar 100 kr). Kongressen börjar på lördag kl 11.00. På lördag finns lunch att inta i Kulturhusets restaurang kl 13.00. Du betalar där efter eget val. Alltså ingen förbeställd lunch. Eftermiddagskaffe kostar 15 kr och middag vid 18-tiden 120 kr.

Övernattning kan beställas på Hotell Västerhöjd. Dubbelrum per person ca 270 kr. Enkelrum 440 kr. Beställ rum genom att själv ringa tel. 0500-413832.

På söndag kostar förmiddagskaffe 15 kr. Programmet slutar kl 13.00. Därefter enkel lunch som avslutning för dem som vill och hinner 65 kr.

Betala kongressavgift och mat till SEF:s postgiro 2012-3. Ange vilka måltider du vill vara med om.

Vid kongressen i Skövde kommer vi alltså att få veta mer om vad det innebär att vara frivillig medhjälpare vid världskongressen i Göteborg till sommaren. Även du som inte kan komma till Skövde får givetvis ställa upp som medhjälpare vid världskongressen.

Vi behöver minst 25 personer som vill följa med i de bussar som under världskongressen åker iväg åt olika håll under heldagsutflykterna. Det förekommer även kortare bussutflykter under ett par dagar. Ett urmärkt tillfälle för dig som kan en del esperanto att få använda språket.

Styrelsen

Om Eldonas* roll

Om man ser tillbaka på Eldonas historia under de senaste femtio åren, kan man knappast undgå att fundera över vissa saker. Eldona har gett ut en bra svensk-esperantisk ordbok och den nästan epokgörande *Etimologia Vortaro*. Detta är insatser som står sig även vid kritisk granskning.

Om man inte analyserar saken, räknar man kanske till det positiva också att Eldona gett ut översättningslitteratur av hög klass och tillsammans med Ivo Lapenna tog Eldonas tidigare ordförande Sven Sjöblom initiativ till prestigserien *Oriente-Okcidento*.

Ekonomiskt har det funnits en föreställning att Eldona av idéella skäl skulle minimera vinsten av bokutgivningen och sikta på nollresultat. Detta gav upphov till skulder och stagnation. Stagnationen har börjat övervinnas genom att Eldona fick motta ett legat, som löste den ekonomiska krisen och genom att det tillsattes en valberedning, som gjorde att nya människor började intressera sig för Eldonas verksamhet.

Nu gäller det att lära av erfarenheterna. Målsättningen att sikta på nollresultat byggde på föreställningen, att andra än förlaget självt skulle skaffa nya svenska kunder, dvs nya esperantister, och att marknaden för läroböcker och ordböcker därigenom skulle växa. Men den idén hör hemma i en annan tid.

Nu måste Eldona hjälpa sig självt att skapa en svensk kundkrets genom att ge ut böcker på svenska, som både kan säljas och väcka intresse för esperanto. I bästa fall också böcker, som kan utplåna den äkta eller låtsade okunnighet, som visas upp av kulturetablissemangen. Och med lite

uppfinningsrikedom finns säkert också andra vägar än bokutgivning. Tänk om det kunde bildas en förening "Eldonas vänner" som på olika sätt kunde stödja förlagets verksamhet?

Eldona bör självklart använda den partner, som har folkbildning som en av sina främsta uppgifter, nämligen biblioteken. Om man nu går till kommunala biblioteks kataloger för att undersöka beståndet av esperantoböcker av olika slag, så finner man ofta en stark överrepresentation av böcker, som gavs ut före 1950 och det är ofta inte sådana, som stimulerar intresset.

I den mån Eldona ska ge ut böcker på esperanto för internationell publik, bör det vara för att detta ska ge ett ekonomiskt överskott, som kan användas för marknadsföring av esperanto i Sverige. Det betyder inte att man behöver ge avkall på kvaliteten. *Etimologia Vortaro* är ett exempel på detta.

Om vårt primära mål är att ge ut översättningar för vår utländska kundkrets orsakar vi mera skada än nytta. Det finns andra, som har mindre dåliga möjligheter att göra sådant och Eldona bör inte försämra deras konkurrensläge. Fonto i Brasilien har nyligen gett ut Sten Johanssons översättning av Nils Holgerssons underbara resa och det är ett utmärkt exempel på hur det bör gå till. Fonto kan trycka och sälja detta verk till ett pris, som Eldona inte skulle kunna åstadkomma.

Får en sådan ny målsättning för Eldona stöd av esperantisterna i Sverige?

Bertil Nilsson

* Eldona = Eldona Societo Esperanto, Förlagsföreningen Esperanto

Avo Frosto lernis Esperanton

Eta Ebba sendis leteron al Avo Frosto ĉe la Norda Poluso. Ŝi skribis ke ŝi havas 5 jarojn kaj deziras diskotekan globon (disco-kula). Ŝi ricevis bele kolorigitan respondon, kie Avo Frosto interalie priskribas la aktivadon en sia produktejo de ludiloj. Li ankaŭ skribis ke li tiom ŝatas la leteron de sia "malgranda amiko", ke li petis la elfon laŭtlegi ĝin dufoje. Tion kompreneble plaĉis al Ebba. Kaj malpakinte siajn kristnaskajn donacojn ŝi trovis eĉ du diskotekajn globojn!

Ann-Louise Åkerlund



Kiam Werner Aspenström - kaj multaj aliaj - lernis Esperanton

La bildo maldekstre:

Kvin kursanoj, probable en 1933, fotitaj dum dimanĉa promenado. Ili estas de dekstre Artur Persson, Harry Persson, Elof Karlsson, Lennart Andersson kaj Martin Persson.

La Espero nur malofte aperigis artikolojn pri la historio de la Espeanto-movado en Svedio, eble ĉar ni volas esti moderna movado. Ni tamen klopodos iom ŝanĝi tiun sintenon. Tial ni nu aperigas du malnovajn bildojn, kune kun kelkaj linioj el letero ricevita.



La bildo dekstre: La unuaj esperanto-studentoj en Stimmerbo-Torrbo. En la antaŭa vico: Artur Persson, Otto Linder, Lennart Andersson. Surgenue: Elof Karlsson. Malantaŭa vico: Agda Aspenström, Werner Aspenström, Harry Persson, Martin Persson, Sven Norman.

Mi aĝas 84 jarojn kaj esperantisto mi fariĝis jam 14-jara. Mia hejmo estas en kampara (siatepe ferfandea) vilaĝo Stimmerbo en paroĥo Norrbärke. Mia pliaĝa frato Artur ĉirkaŭ 1930 hazarde legis pri Esperanto, tuj interesiĝis kaj sukcesis havigi al si lernolibron. Li memstare trastudis la libron - kaj eksciante ke lerneja instruisto Stellan Engholm en vilaĝo Nyberget estas fervora espeantisto Artur Serĉis kontakton kun tiu sola samideano. Post prelego de Stellan en Stimmerbo formiĝis Esperanta studrondo kun Artur kiel gvidanto. Partoprenis

i.a la estonta poeto kaj verkisto Werner Aspenström.

Frato Artur perfektigis sin lingve kaj dediĉis kelkajn jarojn antaŭ la milito al eksterlanda aktivado kiel kursgvidanto en Danio, Francio kaj Svislando. Pro la milito tiu agado finiĝis.

En tiu tempo kun ampleksa senlaboreco kaj nur sesjara deviga instruado tamen mirakle floris idealismaj popolmovadoj kaj kreskis studemo inter la junularo.

Ĉefe enkadre de ABF aranĝiĝis esperantokursoj plurloke kaj baldaŭ fondiĝis esperantoklubo, kiu kunvenis en kafeja ĉambro en Smedjebacken. Regule partoprenis Stellan Engholm, kiu venis biciklante kiel ni aliaj

el diversaj vilaĝoj. Kelkfoje nin vizitis bone konataj eksterlandaj esperantistoj kiel Julio Baghy, la hungara bardo, kaj la bengaldevena L. Sinha. Kia feliĉa sento kompreni ilin lingve kaj eĉ interŝanĝi vortojn buŝe...

Du aktivuloj en la klubo estis elektitaj kiel "propaganda komitato". Ili skribis al diversaj asocioj en la regiono kaj ofertis senpagan viziton kun programeto pri Esperanto kun "unua" leciono, finita per komuna kanto (Patro Noa). La komitato fakte povis prezenti sian programon plurfoje. La aktoroj venis sur peze ŝarĝitaj bicikloj.

Estas vere ke mi kelkfoje sopiras al fora tempo, tiel malriĉa kaj tiel riĉa.

Martin Persson



LINGVO

La deveno de "edzo" - vera unikajo

La plej multaj vortoj en Esperanto devenas de latinidaj lingvoj. Ankaŭ multaj lingvoj devenas de germanaj kaj slavaj lingvoj. Nur malmultaj vortoj estas vere artefaritaj.

Unu vorto, kiu fakte estas artefarita, aŭ kiu ekestis en nekutima maniero estas *edzo* (en la sveda: äkta man, make). En Oficiala Gazeto, Dec. 1913, ni povas legi: "En la germana lingvo,

reĝido, heredonto de la krono estas nomata *Kronprinz*, kiu fariĝas en Espeanto kronprinco. La virino kunigita kun la kronprinco per leĝa ligilo estas nomata germane *Kronprinzessin*. Ĉi tiun lastan vorton D-ro Zamenhof transskribis Esperante *kronprincedzino*, kaj li tuj rimarkis, ke la finiĝo de tiu vorto, t. e. *edzino*, ricevis per si mem la sencon de virino kunigita per

viro per leĝa ligilo. Li do faris el ĉi tiu vorto: unue, ĝeneralan sufikson, esprimantan difinintan rilaton, kaj due, vorton memstaran kun tiu sama signifo. Poste el la vorto edzino li tute logike devenigis la vorton *edzo*.

Esperanto i Chaplins Diktatorn

Charlie Chaplins Diktatorn är en av filmhistoriens mest laddade politiska satirer, men också en unik kombination av konstverk och älskad komedi. Filmen om Adenoid Hynkel, diktator över Tomanien, och hans dubbelgångare, den lille judiske barberaren, bägge spelade av Chaplin, är omskakande både för hjärnan, hjär-

tat och skrattnuskulaturen.

Handlingen är följande. I slutskedet av första världskriget räddar en klumpig liten judisk infanterist, som i det civila är barberare, livet på Schultz, en hjältemodig stridsflygplan. Det omaka paret flyr från slagfältet i Schultz flygplan men kraschar. Den lille barberaren förlorar minnet och hamnar på sjukhus under många år. När han skrivs ut har situationen i hans hemland Tomanien förändrats radikalt, diktatorn Adenoid Hynkel, som av en ödets nyck är en identisk kopia av den lille barberaren, har tagit makten. Hans mål är att skapa ett blont och ariskt imperium styrt av en mörkhårig kejsare.

Den lille barberaren öppnar sin gamla frisersalong, som nu hamnat i det judiska gettoto – Hynkel tycker bland mycket annat inte om judar och har inrättat getton för att hålla kontroll på dem – och försöker att leva ett stillsamt barberarliv. Han förälskar sig i en ung flicka, Hannah.

En dag råkar den lille barberaren i trassel med Hynkels stormtrupper men räddas ur knipen av Schultz, numera hög officer i Hynkels armé. Han ser dessutom till att det judiska gettoto får beskydd av armén. Schultz arresteras dock snart för att vara för judevänlig. I transporten till koncentrationslägret möter han den lille barberaren och de två lyckas fly till

grannlandet Osterlich i lycklig ovetenskap om att Hynkel förbereder en invasion av landet.

Hynkel väver sina imperiebyggande planer i sitt palats. Han drar upp invasionsplanerna trots att han kommit överens med sin diktatorskollega Benzino Napaloni från landet Bacterien att ingen av dem skall anfälla Osterlich. Trupperna sätts i rörelse och ödets allt mer intrikata vindlingar för nu Hynkel och hans identiska dubbelgångare närmare varandra medan omvärlden håller andan...

Diktatorn har sedan december utsatts på biografen landet runt och vi esperantister känner till att esperanto har en särskild roll i filmen. Skyltarna i det judiska gettoto är skrivna på esperanto. Gunnar Gällmo har sett filmen: "Jag kan tipsa att man som esperantist får det lilla extranöjet att kunna kolla in språkfelen på skyltarna i gettoto - Restoracioz, Lipharoj tondadoz (på huvudpersonens butik) och - allra bäst - "Terpumojo". (Jorkekorrar har jag hört talas om, men...) Om det handlar om slarvfel, eller om Chaplin avsiktligt behandlade esperanto på samma sätt som tyskan, är mig obekant. Annars är filmen ännu aktuell. Dess värre." Så långt Gunnar Gällmo.

Leif Nordenstom

Källa: Pressmeddelande från Svenska Filminstitutet

Chaplin i rollen som den judiske barberaren (till vänster och på omslaget) och som diktatorn Hynkel (nedan). Lägg märke till att man anar skyltar på felstavad esperanto i det judiska gettoto. Alla bilder: Svenska Filminstitutet.



Bonhumoraj japanoj volas veni al l' kongreso en Göteborg

DEZIRAS KORESPONDI

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al: Koresponda servo de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 JAPANIO. Skribante korespondopeton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn. Estas rifuzataj monhela peto kaj propono je komerco. Aldono de du internaciaj respond-kuponoj estas bonvena por faciligi nian laboron.

Mi deziras korespondi kun virino. Mi interesiĝas pri angla lingvo, Esperanto, aikido, aŭdvida komunikado, saksofono, ekologio, desegno, feliĉo, paco, biciklado, agrikulturo, vegetarismo. Ankaŭ mi pripensas la eblecon loĝi en via lando kaj lerni la svedan lingvon: Juan Carlos, Apartado de correos 5326, 460 80 Valencia, HISPANIO. Aŭ: JuCGE@universia.es

Japanio estas mirinda lando, eĉ en decembro. Japanaj esperantistoj estas tre afablaj kaj helpemaj. Tiel mi volas konkludi tion, kion mi spertis dum 15 tagoj diversloke, por informi pri la venonta UK en Göteborg.

Mi ne venis kiel turisto, mi estis tute serioze invitita por renkonti esperantogrupojn diversloke, por informi pri la venonta UK en Göteborg. Gesinjoroj Ooba en Tokyo, tre afabla kaj aktiva paro, invitis min kaj ellaboris 15-tagan planon por vojaĝoj, vizitoj, prelegoj kaj aliaj aktivecoj. Ĉio estis detale kaj bone planita kaj preparita. Mi ĉiam havis helpon de asistantoj, gvidantoj kaj kunvojaĝantoj. Ĉu mi vere bezonis tiun preskaŭ tuttempan asistadon? Jes!

Sen lingvo, sen legkapablo kaj sen mapo en la 12-miliona urbo Tokyo, ne eblas trovi direkton aŭ vojon al iu ajn dezirata celo. Multaj bonaj esperantistoj fariĝis partoj en la ĉeno de asistantoj.

Mi partoprenis en du Zamenhofaj festoj. Unu jam la 7-an de decembro, la alia okazis en Tokyo la 15-an. Tiu lasta estis aranĝita por membroj de la Tokio klubo kaj Oomotanoj, kaj ĝi okazis en la Oomotoo centro. Tie mi prelegis pri nia kongreso kaj montris projekciitajn bildojn.

En Tokyo mi estis invitita al vespermanĝo kun la 12-persona estraro de Japana Esperanto-Instituto, JEI. JEI funkcias kiel SEF, kiel landa organizaĵo. Mi konis jam kvar el la estraranoj. Tri tagojn poste mi laŭ invito vizitis familion Syozi kaj tie renkontis la germanon Ulrich Lins, iama estrarano de UEA, Ragnar Baldursson, diplomato por Islando kaj lia filo, alia konata UEA-estrarano, Baldur Ragnarsson. Tria gasto estis iu italo, kiu nun loĝas en Tokyo.

Sinjoro Ooba estas prezidanto de la Tokia Esperanto-Klubo. li estas profesoro kaj instruas komercan administradon en universitato Obirin. Tie li havas du klasojn, kiuj studas Esperanton. Mi vizitis ilin. mi ankaŭ vizitis alian universitaton, kie Atsuo Ooba gvidas esperantoklasojn 80 minutojn ĉiusemajne dum du jaroj. Estis amuze renkonti tiun klason, ĉar ili estis tre scivolemaj pri Svedio. Ili ĉiuj gaje svingis la brakojn kiam mi ekparolis pri Pipi Ŝtrumpolonga. Mi do aldonu ke tiu klaso konsistas el junuloj, kiuj studas malsanflégadon.

Kursgvidado

En la Oomotocentro en Tokyo mi akceptis instrui Esperanton al 20 personoj, kiuj komencis kurson antaŭ du monatoj.

Mi dormis dum kvar noktoj en Oomotocentro. La dungitoj donis helpon kiam mi bezonis, ekzemple helpi al mi sendi interretan mesaĝon al mia edzino.

Norden

Atsuo Ooba akompanis min al la trajno Ŝinkansen. Post tri horoj mi atingis urbon Morioka, 460 kilometrojn norde de Tokyo. En Morioka mi renkontis klubanojn kaj familion Itagaki, kiu havis min kiel gaston dum du noktoj. La sinjorino kaj la 28-jara filo tre bone parolas Esperanton, sed la edzo, profesoro pri la angla, ne intencas lerni. Tamen tre afabla kaj gaja persono.

Post Morioka mi haltis en urbo Fukushima, 200 kilometrojn sude de Morioka. Tie kelkaj klubanoj aranĝis tre agrablan lunĉon en tipe japana restoracio iom ekster la urbo.

Al Kyoto

Post du noktoj en Tokyo mi iris al Kyoto, kie mi renkontis kelkajn klubanojn. La unuan nokton mi dormis en la dome de JEI-estraranino Tahira. Vespere en la dua tago ŝi transdonis min al malnova konato Takeuti, kiu estas komitatano en UEA kaj estrarano de JEI. Li kondukis min al alia urbo. Tie mi verspermanĝis kun ok klubanoj en bela restoracio. Poste ni iris al lokalo, kie estis aliaj klubanoj, komencantoj, kaj mi ricevis unu horon por reklami pri la kongreso en Svedio.

Takeuti reakompanis min al Kyoto, kie unu virino atendis por akompani min al alia urbo ekster Kyoto. Ni alvenis malfrue al ŝia domo kaj estis tempo por dormi.

Antaŭtagmeze la postan tagon ŝi akompanis min al alia urbo, Ĝojo. Tie atendis klubanoj por aŭskulti mian propagandon por la kongreso. Post komuna lunĉo ili akompanis min al granda temploparko en urbo Nara. Post kafeja vizito, unu el la klubanoj akompanis min trajne al alia urbo. Tie renkontis nin aktiva esperantistino Ricko Huĝimoto. Hejme ĉe ŝi sidis jam kvin personoj, inter ili iu nederlandano kun japana edzino. Venis pliaj gastoj. Je noktomezo finiĝis la festeno, kaj mi eniris en mian ĉambron por vere dormi.

Matene la postan tagon Ricko iris kun mi al alia stacio. Nun mi devis sola veturi per trajno dum 30 minutoj al alia stacio. Tie renkontis min alia virino, kiu akompanis min al alia trajno dum preskaŭ du horoj al Kyoto. Denova alia asistantino. Ŝi akompanis min al Kameoka, la centro de la religio Oomoto. Tie estas grandega parko kun multaj domoj, kaj tie laboras ĉirkaŭ cent homoj. Tie troviĝas speciala oficejo de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto, kie laboras spertaj esperantistoj. Vespere mi estis invitita al trankvila festeno kun kelkaj personoj, kiuj bone parolas Esperanton. Mi ricevis kafon kaj sakeon.

Je la 6-a postan matenon, mi estis preta por aŭtoveturo al la stacio. Post tri horoj ni atingis la flughavenon Kansai, kaj la japana aventuro finiĝis.

Roland Lindblom



Zamenhofa festo en la klubo en Machida. En la mezo sidas Rainar Kurtz el Stuttgart. Dekstre de li sidas mi. Dekstre de mi sidas la prezidanto.

DEZIRAS
KORESPONDI

Knabino 16-jara, vigla, amanta la vivon, interesiganta pri filozofio, poezio, literaturo, lingvoj kaj esperantologio. Mi deziras korespondi kun diversaguloj; kaj (eble) gastigi en sia domo, en Krakovo. Krystyna Hawlena, Ul. Cisova 18, PL.30-229 KRAKOW, POLLANDO.

Mi estas 55-jara franco. Mi loĝas en antaŭurbo de nia kvara granda urbo Toulouse (Tuluzo) kaj estas profesie gimanzia instruisto. Mi estas poligloto. Mi ŝatas vojaĝi, lerni lingvojn aŭ praktiki ilin, legi literaturon aŭ pri historio, verki kaj traduki, mi partoprenos la kongreson en Gotenburgo. Mi serĉas sved(in)on por perfektigi en sveda lingvo (kiun mi legas sufiĉe flue, sed ne havas eblecon skribi). Kompreneble parto de nia korespondado povas okazi ankaŭ en esperanto (aŭ franca, germana kaj ankaŭ kelkaj lingvoj)...
Mia adreso:
Robert Pontnau,
6 rue du Ségala
F 31180 Castelmaurou, Frankrike
Prefere rete
Naupontr@aol.com

Lingva demando
daŭre tabuo en la
Eŭropa Unio

Antaŭ la renkontiĝo de la Konsilio de la Eŭropa Unio en Kopenhago (12-13 decembro 2002) dum la pasinta semajno estis prezentita raporto de la prezida ŝtato, nome Danio, pri la uzo de lingvoj en la kunsidoj de la Konsilio en la pilarĝigonta Unio de post 2004. La raporto proponas ke la EU-ŝtatoj trovi akordon pri la maniero kaj ankaŭ pri la buĝetado de la interpretado dum la kunsidoj de la Konsilio ĝis junio 2003.

Krom la ideo daŭrigi la ĝisnunan sistemon ke ĉiu oficiala EU-lingvo estu uzbla kaj la kostoj de la interpretado estu kovrita de la EU-buĝeto ekzistas t.n. "sveda" modelo, kiu antaŭvidas ankaŭ daŭre la eblecon paroli kaj aŭdi interpretadon en ĉiuj 'oficialaj' lingvoj. La diferenco kuŝas en la financado, ĉar la 'sveda' modelo diras ke ĉiu ŝtato devas pagi por sia propra lingvo. Se ekzemple estona registaro volas ke la estona lingvo estu interpretita dum konsiliaj kunsidoj, Estonio devas kovri la elspezojn. "Germanio fakte subtenas tiun 'svedan' modelon", diras ambasadoro d-ro Wilhelm Schönfelder de la daŭra germana reprezentejo ĉe la Eŭropa Unio, "sed pluraj ŝtatoj ne konsentas kun tiu modelo." La kialo fakte estas sufiĉe evidenta: Ŝtatoj kiel Francio aŭ Germanio havas sufiĉe da financa forto por pagi la kostojn de interpretado dum konsiliaj kunsidoj. Por malgrandaj ŝtatoj kaj por ekonomie malmpli fortaj ŝtatoj tio fariĝas jam problemo kaj principa demando, ĉu la EU devas kovri kostojn de interpretado ĉe propraj instituciaj kunsidoj aŭ ne.

"Ni efektive je la fino tute ne diskutis pri tiu raporto prezentita de dana prezidanteco kaj sekve ankaŭ ne aperas iu rezolucio aŭ simile en la prezidentaj konkludoj (vd. <http://www.europa.eu.int/council/off/connclu/index.htm>), malkaŝas Schönfelder dum prelego ĉe la Friedrich-Ebert-Stiftung Bruselo. "La lingva demando estas daŭre tiom tikla afero, ke vi ĝin apenaŭ povas tuŝi. Nek nun en Kopenhago nek ĉi tie en Bruselo", diras la germana ambasadoro kaj konkludas, ke "ni supozeble daŭrigos kun la plurlingva reĝimo ene de la EU".

Marko Naoki Lins
Brusela Komunikadcentro

Ĝemelaj urboj

Wu Guojiang, komisiito de UEA pri ĝemelaj urboj dissendis "Informilon de Ĝemelaj urboj" en kiu oni povas legti pri dekoj da projektoj en kiuj esperantistoj en malsamaj landoj aktive kunlaboras en ĝemelurbaj kontaktoj.

Kiel ekzemplo li skribas ke Gotenburgo, en kiu okazos la sekvonta Universala Kongreso havas multajn ĝemelajn urbojn: ekz. Aarhus (Danio), Tallinn (Estonio), Turku (Finnlando), Oslo, Bergen (Norvegio), Shanghai (Ĉinio), Krakow (Pollando) kaj Port Elizabeth (Sud Afriko).

Wu Guojiang pensas, ke antaŭ ol krei novajn ĝemelajn urbojn (laŭ propono de la esperantistoj), ni devus profiti la jam ekzistantajn oficialajn ĝemelajn urbojn kaj provi fari la kontaktojn kun la eventualaj esperantistoj de tiuj urboj. Tiamaniere ni povus montri al la neesperantistoj ke pere de Esperanto fakte kaj efektive estas kultura interŝanĝo inter la ĝemelaj urboj kaj anonci tion en la amas-komunikiloj.

S-ro Roland Schnell el Berlin en Germanio skribas: Por interna laboro de Esperanto la ĝemelurboj estas sensencaj. Por mi ne gravas ĉu esperantisto estas de ĝemelurbo aŭ de tute alia urbo. Por la gazetaro aŭ oficialaj instancoj ege gravas. Mi tre ĝojus, se vi povus substreki tion en via informado. Alie la ĝemelurbaj kontaktoj nur estas plia peno.

Praktika utilo de Esperanto en la ĝemelurbaj kontaktoj povas esti ofertata al studentoj, kiuj deziras studi en la koncerna lando aŭ al malgrandaj entreprenoj. Ili povas per Esperanto trovi partnerojn.

Ne indas igi ĉiujn lerni Esperanton, sed Esperantistoj de ambaŭ ĝemelurboj povas agi kiel tradukantoj aŭ prizorgantoj de informoj. Tiel ili montras la praktikan utilon de Esperanto.

S-ino Soile Lingman el Stokholmo en Svedio skribas: Mi estas prezidantino de la Stokholma Esperantoklubo kiu havas bonajn rilatojn kun la baltmaraj landoj Finnlando, Estonio, Latvio, Litovio kaj Kaliningrado/Ruslando. Niaj esperantistoj regule partoprenas en la esperantorenkontiĝoj en iliaj landoj kaj kelkfoje ankaŭ reciproke.

Plej multaj
esperantistoj en
Litovio

Norvega Esperantisto prezentis interesan statistikon. Oni komparis la nombron de membroj en Esperanto-organizaĵoj laŭ la membrostatistiko de UEA por la fino de 2001 kun la nombro de enloĝantoj en diversaj landoj. Plej elstaras Litovio kun 280 membroj por ĉiu miliono da enloĝantoj. Sekvas Islando kun 267 kaj Luksemburgio kun 246. Poste venas Malto kun 125.

Sekvas grupo da sep landoj: Ĉeĥio 94; Svedio 90; Slovenio 80; Finnlando 78; Norvegio 77; Belgio 70 kaj Togolando 68.

Sub ili estas Kroatio 56; Rumanio 53; Danlando 44; Estonio 39; Nederlando 39; Israelo 34; Hungario 32; Portugalio 30; Bosnio 29; Latvio 29 kaj Slovakio 27.

Tamen memoru ke tio ĉi ne estas statistiko pri la nombro de esperantistoj. Multaj esperantistoj ne estas membroj de Esperanto-organizaĵo, aŭ nur de iu organizaĵo, kiu ne aliĝis al UEA. Tio precipe validas por malriĉaj landoj ekzemple en Afriko, kie la mono por pagi membrototizon, estas pli bezonata por aliaj aferoj. Kiam organiziĝas klubkunvenoj tamen venas amaso da homoj.

TEMO

Ŝakfiguretoj

La ŝakfiguretoj nomiĝas en Esperanto:

reĝo - *kung*;
damo - *dam*;
kuriero - *lōpare*;
ĉevalo - *hāst (springare)*;
turo - *tor*;
peono - *bonde*.

Aliaj ŝakterminoj estas:
ŝak! / ŝakon! - *ŝack!*;
aroko - *rockad*;
mamo - *matt*;
pato - *patt*;
preterpasa preno - en passant-draget.

DONACOJ

Bengt Lindqvist, Umeå, 50 kr; Ingrid Östlund, Eskilstuna, 200 kr; Martin Persson, Orsa 200 kr.

MEMORE ALL LISSI PERSSON, SVEDALA

Gertrud Lund, Malmö, 50 kr.

FONDUSO 70+

Britt Ingevald, Hässelby, 200 kr; Esbjörn Stridell, Garpenberg, 200 kr; Karl Elofsson, Leksand 160 kr; Inez Lagercrantz, Falun, 160 kr; Lennart Lagercrantz, Falun, 160 kr; Vera Persson, Leksand, 160 kr.

RONDO LANGLET

Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lennart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hannerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205.

Esperanto en Nationalencyklopedin

Alvenis komento al la artikolo pri tradukoj el Esperanto en la svedan en LE 2002:6:

Unu detaleta povus esti kompletigita: Stellan Engholm ne estas la sola esperantoaŭtoro kiu havas propran serĉvorton en Nationalencyklopedin. Ankaŭ Szilagyí. Mi faris libertekstan serĉadon en la retversio de NE kaj trovis ke ankaŭ estas kelkaj personoj, pri kiuj oni mencias ke ili verkis aŭ agadis Esperante, kvankam tio ne estas ilia ĉefa okupo: Fréchet, Hammarberg-Åkesson, Kiselman, kaj kompreneble Zamenhof. Ili menciigas ankaŭ en la papera versio de la enciklopedio

Bo Sandelin

Eldona ekspozicias kaj eldonas

Agneta Emanuelsson, Bertil Nilsson, Gunnar Gällmo kaj Anita Dagmarsdotter dum la Zamenhof-tago, la tago de la Esperanta libro, en la 15a de decembro, en EsperantoCentro en Stokholmo prezentis la librojn eldonitajn de Eldona Societo Esperanto, kaj diskutis estontan eldonadon kun vizitantoj.

Agneta kaj Bertil la 14an de decembro partoprenis la kristnaskan feston de la klubo en Norrköping kaj montris la lastatempan eldonon de la eldonejo.

Agneta Emanuelsson

Lund daŭre agas pri Tanzanio

La Esperanto-klubo en Lund jam dum kelkaj jaroj havis kunlaboron kun Esperanto-kluboj en Tanzanio.

La projekto komenciĝis jam antaŭ kelkaj jaroj. La klubo ekhavis amikecan Esperanto-klubon. En Lund la klubo organizis amikecan rondon, kiu organizis regulan korespondadon kun la amikeca klubo. La Lund-anoj sendis ankaŭ lernolibrojn por ke la klubo en Tanzanio povu organizi studrondon pri Esperanto. Tion ili ankaŭ faris.

La Lund-anoj rimarkis ke la Tanza-

nias esperantistoj estis eĉ pli malriĉaj ol kion oni povis imagi. Tial ekestis la ideo helpi al ili per lanĉado de metodoj por suna kuirado. Oni sukcesis ricevi subtenon de SIDA (Sveda internacia evoluiga administracio), kiu pretis pagi 80 % de la kosto por la projekto. La ceteron la Lund-anoj klopodis kolekti en Svedio, ekzemple vendante kalendarojn.

La projekto pri suna kuirado donis al la klubo en Lund ankaŭ kontaktojn kun esperantistoj en Francio kaj en Tampere en Finnlando, kiuj volis helpi pri la projekto. (Vidu ankaŭ la artikolo en LE 2002:6, p. 9.)

Helpa projekto estas inspira por la kluba laboro, sed oni devas konscii ke ĝi signifas grandan laboron.

Laŭ intervjuo kun Anna-Maria Lange

Ekspozicioj dufoje en Malmö

Dufoje en septembro Klubo Esperantista en Malmö aranĝis ekspoziciojn dum aŭtuna festo en Beijers park kaj dum la tago de la asocioj sur Gustav Adolfs torg. Multaj homoj ĉirkaŭvagadis ambaŭloke kaj nekutime multaj haltis ĉe la budo de KEM. Espereble kelkaj el ili aliĝos al kurso por komencantoj.

Komencantoj inter 10- kaj 84-jaraj

En Helsingborgo komenciĝis studrondo kun sep partoprenantoj. Eble ĝi estas unika, ĉar la plej jun partoprenanto havas 10 jarojn kaj la plej aĝa 84.

Zamenhof-tago kaj tago de Esperanto-libro en Lund

Kiel en 2001 ankaŭ la 15an de decembro 2002 la Esperantoklubo de Lund invitis al festa renkontigo por memori pri L.L. Zamenhof kaj precipe pri la signifo de la esperantlingva literaturo. Ni aŭdis pri Stig Jacobson kaj

la libro "er-ar-o" (v. LE dec. 2002), pri "Svedio Du Bildoj" de Kerstin Rohdin kaj Harold Brown kaj ni legis saluton de Mikael Niemi.

Perletere franca delegito kontaktigis nin kun la sveda verkisto Björn Larsson. Mallonge Daniel Granello prezentis sian unuan beletran esperantolegajon, "La Fermita Konko" kaj ties verkiston Julian Modest. Ankaŭ nur supraĵe Tobias Lund rakontis pri sia malkovro de la himnaro "Adoru".

Ni estis dudek ses gajaj festantoj el diversaj lokoj en Skanio, kiuj samtempe ĝuis antaŭkristnaskan etoson.

A-M Lange

Tredje upplagan om Langlet

Den 17 december 2002 var det 130 år sedan Valdemar Langlet föddes på Spetebyhall i Lerbo.

I samband med jubileet har den tredje upplagan av boken om Valdemar och Nina Langlet av Agneta Emanuelsson utkommit. De tidigare upplagorna är slutsålda.

Esperantisto kaj eldonisto

Delo, la ĉefa ĵurnalo de Slovenio publikigis la 20-an de januaro en sia libro-aldonaĵo 'Knjizevni listi - Literaturo-folioj' tutpaĝan artikolon pri Franko Luin, sloveno loĝanta en Svedio. Grandan atenton oni donas en la artikolo al lia vivo kiel esperantisto kaj eldonisto de elektronikaj esperanto-libroj, eĉ donante la retejan adreson de eLibrejon. La artikolon kaŭzis lia dujara agado kiel eldonisto de elektronikaj libroj en la slovena lingvo faritaj laŭ la sama modelo kiel la esperantaj.

Franko Luin cetere estas ankaŭ prezidanto de Sveda Esperanto-Federacio.

Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanto kulturo



Boris Kolker: Vojaĝo en Esperantlando. Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo. UEA. Rotterdam 2002. 279 p. 165 SEK ĉe SEF.

Jen libro, kiu ne temas pri vojaĝo, sed kiu estas perfektiga kurso de Esperanto kaj gvidlibro pri la Esperanta kulturo. Tial la subtitolo de la libro estas pli taŭga priskribo ol la ĉefa titolo. La libro konsistas el 26 lecionoj. Ĉiu leciono, konsistas el tekstoj, kiuj diversmaniere prezentas la historion, movadon kaj kulturon de Esperanto. Kelkfoje, sed ne ofte aperas prozo aŭ poezio. La enhavo estas moderna. Tial en unu leciono estas teksto pri interreto kaj la uzo de Esperanto en interreto. La leganto povas ankaŭ legi pri vojaĝoj de esperantistoj, kaj ankaŭ kelkajn mallongigitajn popularsciencajn tekstojn, ĉerpitajn el libroj kaj revuoj.

Mi menciui la nomojn de kelkaj artikoloj. Kiel naskiĝis Esperanto? Kelkaj moroj en Belgio. Mikroskope vastaj horizontoj. Konversacia lingvaĵo en nia literaturo. La radio kontraŭ la malbeno de Babel-turo. Esperantaj

memorigaj lokoj en Moskvo. Priservado laŭ japana maniero. IEM: la universala biblioteko de Esperanto.

En ĉiu ĉapitro post la tekstoj estas ankaŭ abunda komentario, kie oni klarigas kaj faktojn en la teksto, kaj gramatikajn kaj lingvajn fenomenojn. Fine de ĉiu leciono estas lingva praktiko, kun kelkdek demandoj pri la teksto. Sur preskaŭ ĉiu paĝo estas bildoj kaj fotoj.


Vojaĝo en Esperantlando laŭ mi estas unu el la plej gravaj kaj uzeblaj libroj, kiuj iam ajn aperis en Esperanto. Kial? Samtempe ĝi estas perfektiga kurso kaj gvidlibro tra Esperanta kulturo. Multaj homoj komencas studi Esperanton, sed multaj nur komencas, kaj neniam fariĝas aktivaj esperantistoj. Mi kredas ke tiu ĉi libro povas esti ponto inter la komencula kaj aktiva esperantismo, sed ĝi estas nur ponto. La libro povas inspiri ankaŭ spertajn esperantistojn profundiĝi en studoj pri lingvo kaj kulturo. Tial ĝi estas taŭga por ĉiu esperantisto, krom por vera komencanto. La libro estas uzebla kaj por kursoj, kaj por sola studento.

Leif Nordenstorm

Facila rakonto distra

STEN JOHANSSON

KION AJN
FACILA
RAKONTO



Sten Johansson. Kion ajn. Eldona Societo Esperanto. Stockholm 2002. 63 paĝoj. 60 SEK.

La plej produktema sveda Esperanto-verkisto verkis ankoraŭ unu libron. Ĉi-foje temas pri vigla rakonto en dek du ĉapitroj, kiuj temas pri okazaĵoj dum internacia Esperanta gejunulara renkontiĝo apud Stoholmo. Sed la libro temas ne nur pri la renkontiĝo. Ankaŭ okazaĵoj en la ĉirkaŭa mondo respeguliĝas en la libro

Ĉar preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ne denaskaj, multaj el ili volas legi rakontojn facilajn. Tiu ĉi libro estas skribita kun kreskanta nivelo de malfacileco, tiel ke la unua ĉapitro estas la plej facila kaj la lasta estas la malplej facila. Post ĉiu ĉapitro aperas klarigoj. Kion ajn konvenas por tiu, kiu jam lernis la plej bazajn vortarojn


kaj gramatikon de Esperanto.

La lingvaĵo laŭ la aŭtoro "konsistas el la praktike uzata, parolata, hodiaŭ vivanta Esperanto." La verkinto sukcesis fari tion, kion li celis. Estas grave ke parolata lingvo estu parolata, ankaŭ kiam oni skribas ĝin.

Kion ajn estas uzebla kaj por kursoj kaj por unuopuloj. Ĝi estas streĉe interesa romaneto. Ankaŭ sperta esperantisto povas legi ĝin nur por ĝui. Tamen, Kion ajn ne estas granda literaturo. Verŝajne ne eblas verki grandan literaturon kun kreskanta nivelo de malfacileco. Se oni volas grandan literaturon oni povas legi alian libron de Sten Johansson. Se oni volas facilan libron, kiu havas la intencon distri oni legu Kion ajn.

Leif Nordenstorm

Bonkvalita japana bildstrio pri estonto



TEZUKA Osamu. La Flambirdo. Parto Furoro. Japana Esperanta Librokooperativo. Tokio 2001. 296 paĝoj.

Se vi iam vizitis Japanion, vi scias ke multaj japanoj legas bildstriojn. Tion vi vidas en restoracioj, en metroo kaj en aliaj lokoj. Japanaj bildstrioj aperas en dikaj libroj. Antaŭ kelkaj jaroj aperis unu tia, Nudpieda Gen, en Esperanto. Ĝi temis pri la sekvoj de la unua atombomba eksplodo. Nun aperis alia libro kies temo estas supraĵe malsimila sed profunde simila.


La Flambirdo temas pri la socio post kelkaj jarcentoj. La mondo estas tiel difektita pro diversaj kialoj, ke la homoj devas vivi en kvin subteraj urbejoj. Ĉu la homoj lernis kiel eviti militojn aŭ ĉu minacas novaj militoj?

Tio estas demando, kies respondo oni ekhavas, se oni legas la libron. En la libro oni povas sekvi la aventurojn de la junulo Masato kaj lia amikino Tamami, kiu ne estas homo, sed "mupio", estaĵo kiu iam alvenis el alia mondo, kaj kiu povas ŝanĝi aspekton.


La Flambirdo estas interesa libro. Ĝi ne estas bildstrio por infanoj, sed por gejunuloj kaj por plenkreskuloj. Ĝi estas ekzemplo de altkvalita japana bildstriarto. En Japanio oni eĉ parolas pri bildromanoj. La verkinto TEZUKA Osamu estas konata bildstriaristo kaj La Flambirdo estas lia monumenta verko.

La traduko Esperanten estas bona. Ĉar mi ne parolas la Japanan mi ne povas juĝi pri la fideleco. La rezulto tamen estas flua parola Esperanto.

Leif Nordenstorm



Baniĝas la herooj en maro. Ĉu vera maro aŭ artifika?



Tria eldono de ŝlosilo pliampleksigita

Bertil Nilsson. Introduktion till esperanto. Tria ĝisdatigita eldono. Eldona Societo Esperanto. Stockholm 2002. 28 paĝoj. 25 SEK.

Iam ekzistis tiel nomitaj "ŝlosiloj" de Esperanto en diversaj lingvoj. Tiu ĉi libro estas pliampleksigita ŝlosilo. Jam aperas la tria eldono de tre konciza enkonduko en la gramatikon de

Esperanto. Ĝi estas uzebla kiel gramatiketo por komencanto aŭ kiel legaĵo por homo, kiu havas ĝeneralan intereson pri lingvoj.

La libro estas tiel malmultekosta ke oni eĉ povas donaci ĝin al bibliotekoj aŭ al amikoj, kiuj demandis iom pri Esperanto.

Leif Nordenstorm



Kallelse till årsmöte för Kristliga Esperantoförbundet i Stockholm den 1 mars 2003. Årsmötet kommer att hållas på Citykonditoriet, Klarabergsgatan 34, kl 11. Vi får hålla till i den turkiska salongen, alltså ett separat rum. Anmälan kan göras till Agneta (08-59122507) eller Mats (060-120255).

Styrelsen

Kelkaj gravaj datoj en 2003

21 februaro-2 marto
Sporta ferio en Lesjöfors. Por lernejoj senkosta skiado en skideklivo. Ankaŭ skikurado, sketkampo kaj sledodeklivo. Loĝu en Esperantogården.

27-27 aprilo
Svena Esperanto-kongreso en Skövde

22-28 junio
Somera lingvokurso en Esperanto-Gården en Lesjöfors.



19-26 julio
Internacia Junulara Kongreso en Esperanto-Gården en Lesjöfors



26 julio - 2 aŭgusto
Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo kaj 35a Internacia Infana Kongreseto en Lerum

3-7 aŭ 2-9 aŭgusto
Kultura Esperanto-Festivalo en Elsinoro (Helsingör) kaj Helsingborgo

Ny bok Nova libro



Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson en traduko de Sten Johansson. 615 paĝoj. 265 SEK

Kaj kelkaj jam ne tute novaj:
Harry Martinsson: Aniaro. 85 SEK
Boris Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando. 165 SEK.
Sten Johansson: Kion ajn. 60 SEK.
Bertil Nilsson: Introduktion till esperanto. 25 SEK.

Beställ från: SEF, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00. E-post: sef@esperanto.se
Moms ingår. Porto tillkommer.

ESPERANTOTUR KAJ FLUGO

Esperantotur funkciis kiel Turisma Servo de MONDA TURISMO dum 30 jaroj (1973-2002) kaj nun pro ekonomiaj kialoj transformiĝis en Internacian Klubon ESPERANTOTUR. De kelkaj jaroj ESPERANTOTUR kunlaboras kun "FLUGO", kiu okupiĝas ĉefe pri aviadila turismo, sed ankaŭ pri E-turismo kaj havas Esperanto-nomon (FLUGO en la pola lingvo LOT - tiel nomiĝas pola flugkompanio). Nun ESPERANTOTUR realigas pere de FLUGO ĉiujn grupojn, tial eblas dediĉi pli da zorgoj pri esperantlingva programo de la sendataj grupoj. Por la 2003 jaro estis planitaj pli ol 100 vojaĝoj, el kiuj pli ol 30 internaciaj.

Al la plej gravaj vojaĝoj apartenas: februare - vojaĝo kun prof. R. Mielcarek al Suda Ameriko (Peruo-Bolivio-Ĉilio-ĝis Fajrolando-Argentino-Urugvajo-Paragvajo-Brazilo), marte - al Centra Ameriko, aprile - ĉirkau la mondo, majo - 19 Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo kun 10 vojaĝvariantoj al Ĉinio, junio - 13 Europa Esperanto-Forumo en Beneluxo kaj Parizo, julio - vojaĝoj Euro-Afriko kun partopreno en la 13 Internacia E-Kongreso kaj 62 Hispana E-Kongreso en Valencio, sep vojaĝoj al la 88 UK en Gotenburgo kaj 59 IJK de TEJO en Lesjöfors kaj aŭguste - Ĉebaltmara Folkloro Festivalo en Riga-Jurmala (Latvio).

Se interesas Vin tiuj E-vojaĝoj kontaktu: Internacian Klubon Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, 85-094 Bydgoszcz, Pollando, tel/faks: (48-52) 3461151
e-poŝto: andreo@rubikon.net.pl



Anmälningssavgifter (Svenska kronor)

	-31 mars	1 apr-
1. Icke direkt medlem i UEA	2185 kr	2605 kr
2. Direkt medlem i UEA (ej MG)	1770 kr	2140 kr
3. Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 73-01-01 och 82-12-31), som inte är medlem i UEA	1305 kr	1580 kr
4. Medföljande, handikappad eller ungdom, som är medlem i UEA.	790 kr	1070 kr

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 82-12-31 betalar ingen kongressavgift.

Anmälningssblankett för kongressen kan beställas hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-501 52. Blanketten skickas tillbaka till samma adress. All betalning sker till SEF Specialkonto, postgiro 14 74 29-5. Ange på talongen en vad pengarna avser.